# La Hodiaŭa Ĵurnalo

**2017-11-27** **n-ro 368**


## Grekio: juna rifuĝinto tretita ĝis morto sur ŝipo




Nombro de mortintoj en egipta terorista atako kalkuliĝis al 305

Propono – transloĝiĝo al vilaĝeto kun alpago da 25 mil svisaj frankoj

Scratch – programista platformo (ne nur) por infanoj

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin
[Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus

Grekio: juna rifuĝinto tretita ĝis morto sur ŝipo
*Dekjara afgano p. 03*

Nombro de mortintoj en egipta terorista atako kalkuliĝis al 305
*Kaj vundis aliajn 128 p. 03*

*Scratch* – programista platformo (ne nur) por infanoj
*Programado povas esti amuza kaj alloga p. 04*

La plej granda valoro
*Sopirata trankvilo kaj la sento de nekredebla eĉ feliĉo p. 05*

Propono – transloĝiĝo al vilaĝeto kun alpago da 25 mil svisaj frankoj
*Ĉe la montoj de Kantono Valezo en Svislando p. 06*

Hodiaŭe
*Vulpo p. 06*

## Grekio: juna rifuĝinto tretita ĝis morto sur ŝipo

Dekjara afgano mortis sabaton la 25an de novembro 2017 sur ŝipo de migrantoj en Mediteranea maro. Foririnte el Turkio, la 66 ŝipanoj, viroj, virinoj kaj infanoj, deziris atingi Grekion. Kiam bulgara ŝipo albordiĝis, okazis panika moviĝo. La infano estis tretita.




«Tia akcidento jam okazis du fojojn antaŭe, menciis la urbestro de la insulo Lesbo [Λέσβος ['lẹzvọs] Mitileno], Spiros Galinos. Tiuj ŝipoj povas akcepti dek personojn. Malgraŭ tio, 30 ĝis 40 personoj enŝipiĝas». «Tio estas okazo por mi, peti helpon denove de Eŭropo. Ĉi tie, juna infano ja mortis».

Kaj, kiam ili sukcesas atingi la bordon, ili estas amasigitaj en koncentrejoj por rifuĝintoj. Kiel tiu de *Moria*, «kiu similas malliberejon», ankaŭ diras la urbestro de Lesbo. Koncentrejo, kiun kelkiuj nomis… Gvantanamo.

Neniam Milito Inter Ni

---

## Nombro de mortintoj en egipta terorista atako kalkuliĝis al 305

Sabate [25 nov 2017] la Egipta ĝenerala prokuroro publikigis deklaron, dirantan, ke la terorisma atako en moskeo vendrede [24 nov 2017] mortigis 305 homojn kaj vundis aliajn 128. Teroristoj tenis flagon de ekstremisma organizo Islama Ŝtato.



La atakita moskeo situas 40 kilometrojn okcidente de la urbo *Al-Arish*, ĉefurbo de la provinco *North Sinai*.

La deklaro diras, ke proksimume 25 aŭ 30 teroristoj ĵetis eksplodaĵojn kaj pafis en la moskeo. Ili pafadis svingante la simbolan flagon de Islama Ŝtato.


Ĝis nun neniu organizo proklamis respondecon pri tiu atako.

Sabate [25 nov 2017] la Egipta armeo proklamis, ke la aeratako starigita de la armeo kontraŭ teroristoj vendrede vespere eniris la duan tagon. Sabate ili detruis iujn bazlokojn de teroristoj kaj bombdetruis multajn eksplodigajn ekipaĵojn kaj armilojn.

Lin
Ĉina Radio Internacia

# *Scratch* – programista platformo (ne nur) por infanoj

Ĉu programado povas esti amuza kaj alloga eĉ por infanoj? Fakte jes! Krome, eblas lerni ĝin eĉ en Esperanto!




Pluraj talentaj homoj de la fama Masaĉuseca Instituto de Teknologio (MIT) demandis sin: “Kiel per amuza kaj luda formo instrui al infanoj (kaj ne nepre nur al ili, samo funkcios al plenkreskuloj) programadon?“ Sekve ekestis la projekto *“Scratch”* [Grati], kiu volas plenumi ĝuste tion – ludeme instrui al homoj bazojn de programado, faciligi la procezon kaj veki kreemon ĉe la uzantoj. La reta platformo nuntempe funkcias jam en pli ol 80 lingvoj, inkluzive Esperanton! (En ĝi ne estas tradukita ĉio – ĉar temas pri tre multaj tekstoj, sed ekzistas la bazo por uzi la retejon plene en Esperanto).

La retejon do eblas elkore rekomendi al ĉiuj, kiuj emas lerni programi, ĉefe al infanoj, sed ankaŭ al kreemaj homoj, kiuj ne nepre volas lerni programadon, sed pere de ĉi-retejo (sistemo) emas utiligi sian kreeman potencialon – en la programo eblas krei vere diversajn kaj diversspecajn aferojn – poŝtkartojn, komputilajn ludojn, videetojn, animaĵojn, kvizojn, kursojn ktp. (Troveblas jam pluraj Esperanto-kursoj en la retejo.) La uzeblo varias ĉefe laŭ viaj kapabloj kaj bezonoj.

Certe indus ankaŭ helpi fintraduki la retejon al Esperanto, temas pri ege utila projekto por nia movado. La retejo de Scratch estas ĉi tie; elekti/ŝanĝi lingvon oni povas sube en la retejo.

Ankaŭ tiun ĉi retejon prezentis E@I la 20an de oktobro al lernantoj en *Partizánske* (sidejo de E@I en Slovakio) okaze de la tuteŭropa aktivado “*Meet and Code*” (Ni renkontiĝu por programi), kiu okazas dum la “Eŭropa semajno de programado”. Ĉi tiu iniciato celas pretigi infanojn kaj gejunulojn por la bezonoj de cifereca mondo de la estonteco, subtenante ĉiajn formojn de programado.

E@I pretigis du programerojn. La slovaka esperantisto kaj profesia programisto Viliam BÚR prezentis al lernantoj kaj studentoj en *Partizánske* sian profesion. Unue en gimnazio li parolis pri la nuna stato en la programista profesio, pri la programlingvoj, pri laboro, avantaĝoj kaj malavantaĝoj de tiu ĉi nuntempe ege bezonata profesio. Poste li kune kun Peter BALÁŽ prezentis *“Scratch”*-on al infanoj de bazlernejo en la urbo. Dum du horoj ili vere kaptiĝis kaj kapablis fari bazajn komputilajn ludojn. Temas pri ege potenca ilo, certe uzinda ankaŭ en la Esperanto-movado!

Peter BALÁŽ
E@I-kunordiganto

La Balta Ondo

# La plej granda valoro

Kiam apud la tagoj troŝarĝitaj pro plej diversaj necesaj okupoj alvenas la momentoj, kiam dum unu, du horoj, oni povas forgesi la ĉiutagajn zorgojn, revenas tre sopirata trankvilo kaj la sento de nekredebla eĉ feliĉo. Kio por mi estas tia tempo?




Mia partopreno en „la paradizo sur la tero" estas lastfoje la ebleco profiti bicikladon en la tereno, kiun mi delonge konis, sed lastatempe komencis ĝui, premante la pedalojn de mia durada veturilo.

Dum pluraj jaroj la preskaŭ forgesita okupo, kiun mi bone memoras el la tempoj de mia infanaĝo, nuntempe denove fariĝis objekto de miaj deziroj kaj streboj por kapti liberajn momentojn de bela vetero, ne nepre suna kaj varma, sed simple ebliganta iom bicikli. Bonŝance akompanas minmia edzino, kiu same kiel mi ŝatas ĉi minutojn de kuna veturado kun la blovanta vento en la oreloj kaj la aromo de herbejoj en la nazo, kaj kun la kapoj admirantaj la ŝanĝiĝantan ĉirkaŭaĵon.

Kutime ni traveturas en nia ŝatata loko ĉ. 7 kilometrojn unufoje, kaj de tempo al tempo en pli oportuna vetero - eĉ 15. Regas tie grandiozaj sonoj, delikataj muĝoj kaj susuroj, blekado de birdoj, ĉirpado de cikadoj kaj tre ofte, krom la blovado de la vento, aŭdiĝas nenio. La kreskanta tie vegetaĵaro malrapide ŝanĝiĝas kune kun la subiranta suno tage kaj depende de la jarsezono. Al la plej ravaj momentoj apartenas la alvenanta vespero, kiam la lumo iom post iom malaperas kaj la birdaro ĉefe, sed ankaŭ la insektaro, prepariĝas al la komenciĝanta nokto. Ĉio tiam poiome silentiĝas, kvazaŭ malrapidus kaj haltus. Tiam kelkfoje ŝajnas al mi, ke mi preskaŭ aŭdas la korbatojn de mia edzino, kiam ni kune silente veturas. Ni estas feliĉaj kaj ni tion al ni parolas de tempo al tempo por ceritĝi, ke ne temas pri iu sonĝo. La mondo, kiun ni ricevis por viziti estas belega, kaj tio okazas apenaŭ 10 kilometrojn de nia loĝloko.

Kia kontrasto. Apud nia dometo proksimas bruaj stratoj, relvojo, kelkaj entreprenoj kaj ĉi tie – restis pura naturo, silento preskaŭ, freŝaero, belaj vidindaĵoj. Sed por kiom longe? Jes, ĉi demando revenas de tempo al tempo, ĉar multas plej diversaj timetoj, la demandoj, ĉu la kruela homo ne decidos baldaŭ tion ŝanĝi…

Intertempe tamen ni klopodas ne pensi pri tio, gravas ĝuste ĉi momento, ĉi tempo, ĉi ĝojo, ĉi feliĉo. Mian rakonteton akompanu kelkaj fotoj, kiuj bildigu miajn vortojn. Vi trovos tie herbarojn, unuopajn arbojn kaj arbustojn, grupojn de arboj, grandajn spacojn de tero kaj nubojn en la ĉielo, nian karan sunon, kiun kelkaj progresemaj sciencistoj klopodas malfortigi diversmaniere, ĉar ja onidire okazas la tutmonda varmiĝo. Ĉu vere ekzistas la neceso manipuli la naturon, kiu ja invitis nin ĉi tien en sia saĝeco? - mi pensas. Mi estas certa, ke la mondo, kie ajn ni vivas, estas tiel bela

kaj valora, ke ni devas fari ĈION por savi ĝin en ties natura formo. La enmiksiĝo de la homo neniam favoras la medion. Ni permesu al la naturo mem reguli ĉiujn procezojn, ni ne malhelpu.

Ni detenu tiujn, de kiuj dependas la estonteco, la sorto de ni kaj niaj posteuloj, niaj infanoj ĉefe. Ni ja respondecas pri tio, kia restos nia tero estonte. Ni observu, kontrolu, pensu kaj - se necese – protestu. Ni homoj povas ion fari por la plantoj kaj bestoj, kaj por ni mem. Dankos al ni la verdaj herboj kaj folioj, la blua ĉielo kaj varmbrila suno, la refreŝiga vento kaj viviga pluvo. Ni memoru pri tio. Ni batalu!

Fotaro (vidu).

Andreo BACH
Esperanta Retradio

# Propono – transloĝiĝo al vilaĝeto kun alpago da 25 mil svisaj frankoj



Je la 30-a de novembro la konsilantaro de la malgranda svisa vilaĝo Albineno voĉdonos proponon, kiu kreos profiton al tiu kiu venos loĝi tien. La propono celas la bremson de la loĝantara malaltigo.

Albineno staras 1 300 metrojn alte ĉe la montoj de Kantono Valezo en Svislando, kaj nur 240 homoj loĝas tie. Antaŭnelonge la foriro de tri familioj el tie devigis la fermon de la loka lernejo, informis la urbestro Beat JOST al la svisa gazeto ATS. Tial la tieaj sep infanoj nepre faru 20-minutan busveturadon ĝis la lernejo de najbara urbo.


Jen la proponotaj avantaĝoj:

– 25 mil svisaj frankoj.
– aldone 25 mil svisaj frankoj por edzo/edzino.
– aldone po 10 mil svisaj frankoj por infanoj.

Jen la proponotaj kondiĉoj:

– 10-jara loĝado.
– aĉeto de domo (200 mil svisaj frankoj).
– 45-jaraĝulo aŭ pli juna.
– ĉefa loĝloko, ne la dua.
– repago de profito pro malobservo de kondiĉo

Paulo Cesar PIRES
esperanto.blog



## Bildo de la tago

***Vulpes vulpes*, *Nome*,**

**Alasko.**

**Vikipedio**